

Lingvistikaj aspektoj de Esperanto

Radioprelego de Claude kaj Andrée GACOND, SRI 465, 1981.03.26 & 28

Cl.- Parolas nome de Svisa Radio Internacia Claude kaj Andrée Gacond.

Al ĉiuj, kiuj deziras ricevi objektivan superrigardon pri nia lingvo, ni konsilas la verkon "Lingvistikaj aspektoj de Esperanto" de John Wells, eldonaĵo de UEA.

A.- Tiu ne tre dika libro, ĝi estas nur 76-paĝa, kvankam absolute scienca restas ĉiam facile legebla de studema neofito. Temas fakte pri serio da prelegoj prezentitaj dum la Internacia Somera Universitato en la kadro de la 61-a Universala Kongreso de Esperanto en Ateno, en aŭgusto 1976. John Wells rearanĝis la materialon, aldonante komentojn kaj plibonigojn, kiujn rezultigis la diskutoj, kiuj sekvis la prelegojn.

Cl.- John Wells, en la enkonduko, tiel priskribas la celon de sia kursoa Ni citas:

A.- Ĝia celo estas rigardi la internan karakteron de la lingvo, rigardi ĝin per la okulo de lingvisto, priskribi ĝin kiel lingvon laŭ la kriterioj kaj metodoj de la moderna lingvistiko. Samtempe ni volas meti ĝin en la kadron de tio, kion oni scias ĝenerale pri la homa lingvo kiel kapablaĵo de la homo, kaj specife pri la diversaj homaj lingvoj - en la kadron de tiuj trajtoj, kiuj laŭ onia supozo validas universale por ĉiuj homaj lingvoj."

Cl.- Multe faciligas la studadon aŭ simplan konsultadon de tiu kurso pri la lingvistikaj aspektoj de Esperanto, indekso de la terminoj kaj tabelo de la fonetikaj simboloj uzataj en la teksto. Kaj tre detala enhavtabelo donas klaran komprenon pri la konstruo de la verko, des pli ke la dekuma numerigo helpas en la serĉado de la eroj, kiujn oni sentas la bezonon relegi. Ĉar kurso ne legiĝas kiel romano, eĉ se estas stile modela, kiel ĝenerale estas la verskoj de John Wells.

A.- Por alporti iom precizan ideon pri la konsisto de tiu kurso pri la lingvistikaj aspektoj de Esperanto, ni diru, ke ĝi dividiĝas en 5 grandaj partoj: Enkonduko - Fonetiko - Morfologio - Sintakso - Leksiko kaj Semantiko.

Cl.- La enkonduko komprenigas, ke Esperanto "estas lingvo unika el historia vidpunkto, ĉar lanĉita per la iniciato de unu homo. Unika ĝi estas ankaŭ en tio, ke tiu iniciato ne estis mortnaskita kiel estas tiom da projektoj de komuna lingvo: ĝi ekvivis, ĝi floris, ĝi fariĝis vivanta lingvo, lingvo plene funkcia. Kaj tiu evoluo prezentas fenomenon unikan en la historio de la homaro. Ankaŭ el sociologia vidpunkto Esperanto estas lingvo unika: unika, ĉar parolata kaj uzata de lingvokomunumo lokiĝanta dise tra la vasta mondo, sed de lingvokomunumo kohera kaj sentanta lojalecon al tiu lingvo kaj al la valoroj esprimiĝantaj en ĝi." Ĉio tio estas fakte eksteraj trajtoj de la Lingvo Internacia. Kiel ni jam menciis, John Wells volas rigardi al ni la internan karakteron de la lingvo.

A.- Pro tio li devas akirigi al ni minimumajn konojn pri lingvistiko. Tiucele li priskribas la evoluon de lingvistiko. Sekvas instruado pri la universalaj lingvoj kaj pri la klasifikado de la lingvoj, kiu povas esti geneza aŭ tipologia.

Cl.- Post tiu rapida enkonduko sekvas en la parto dediĉita al fonetiko instruado pri la fonemoj kaj pri la esperanta fonemsistemo, pri la vokalsistemoj de diversaj lingvoj, pri distingaj trajtoj de vokaloj kaj konsonantoj kaj fine pri bona aŭ malbona prononcado en Esperanto.

A.- Desegno kaj tabeloj faciligas la komprenon de tiu ĉi parto, kiu neniel estas tro faka. Kontraŭe, ĝi alportas bazajn konojn, kiujn ĉiuj el ni devus emi alproprigi.

C1.- La parto pri morfologio aŭ formologio, kiel ŝatas diri István Szerdahelyi, ne estas pli malfacile legebla. Ĝi prezentas la plej konatan strukturan tipologion, kiu dividas la lingvojn en la tri tipojn: lingvoj izolaj, aglutinaj kaj fandaj aŭ flekciaj. Laŭ John Wells la Internacia Lingvo Esperanto estas tipe aglutina. Per komparoj inter formoj de lingvoj el la tri tipoj ni malkovras, ke ĉiu lingvo apartenas certgrade al ĉiu el la tri tipoj. Izolado, aglutinado, kaj fandado estas tendencoj ne absolutaj, sed gradaj. Ni fine lernas, ke Esperanto ekspluatas sian aglutinecon por leksikaj celoj pli ol por sintaksaj. Ĝi uzas afiksojn por faciligi la kreon de vortoj; sed uzas finaĵojn nur por kelkaj celoj ĉe la kreo de frazoj. Ĝi ne uzas ilin, ekzemple, por montri en la verbo la subjekton, nek por ŝanĝi aserton al demando. Laŭ John Wells "la aglutineco de la morfologio (en Esperanto) estas unu el la vere geniaj ideoj de Ludoviko Zamenhof, tiom pli genia ĉar en lia epoko la lingvistoj malestimis aglutinecon. Sed nenion li puŝis ĝis ekstremeco, eĉ ne aglutinecon."

A.- En la parto dediĉita al sintakso, John Wells, montras, kiel oni povas tipologie klasi la lingvojn laŭ ordo de la frazelementoj. Povas ekzisti fiksita aŭ libera ordo. Pri la diversaj manieroj distingi inter subjekto kaj objekto, pri la kazoj, la prepozicioj kaj postpozicioj, la vortordo; li instruas, kiel bona pedagogo, helpe de konkretaj ekzemploj ĉiam tre taŭge elektitaj.

Cl.- En la lasta parto dediĉita al la vortprovizo, kiun li nomas leksiko, kaj al la studo de la signifo de tiuj vortoj, la semantiko, John Wells interese raportas pri la kontraŭaj tendencoj al skemismo kaj naturalismo, kiuj konekzistas en Esperanto.

A.- "La leksika bazo de Esperanto estis kreita, post lerta elektado kaj oportunigo, el fontoj hindeŭropaj. La afiksosistemo ebligas al la lernanto ekspluati eĉ limigitan nombron da leksikaj eroj (radikoj) por krei grandan vortprovizon. Dum la leksika stoko evoluis, la skemisma principo, kiu volis ĝismaksimume uzi tiun avantaĝon, devis trovi ekvilibron fronte al la premoj de la rivala naturalisma principo.

Cl.- "La riproĉo, ke Esperanto estas en tro alta grado lingvo esence eŭropa, havas pli da validado en la kampo de leksiko kaj semantiko ol ĉe fonetiko kaj morfologio. Tamen malfacile estus trovi alian, pli justan solvon. Proksimume duono de la tutmonda loĝantaro parolas iun aŭ alian lingvon de la hindeŭropa familio, tiel ke tiubaza leksiko kaj semantiko estas la sola praktika ebleco por lingvo pretendanta la rolon de komuna lingvo internacia. Almenaŭ Esperanto evitas la rigidecon de la etnaj lingvoj, kiuj estas la solaj aliaj seriozaj kandidatoj por tiu rolo."

A.- Per tiuj du citaĵoj ni konkludas nian prezenton de la libro de John Wells pri la Lingvistikaj aspektoj de Esperanto.

Cl.- Vi aŭdis elsendon de Svisa Radio Internacia. Gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond diras al vi: Gis reaŭdo!